Bad Nauheim, Germanujo. Villa Sans-Souci Let, 36, 38; Mem, 17; Gra, 345	15 Sep. 1907
Frankfurt am Main, Germanujo. Z parolas en Steinernes Haus Li, n-ro 166, Okt. 1907, p. 466; Mem, 17	10 Aŭg. 1908
Dresden, Germanujo. Stacidomo Ob, 22; Bru, 66; EE, 112; Mem, 17	10-23 Aŭg. 1908
Dresden, Germanujo. Z gastas ĉe H. Arnhold en Gellert Strasse Zak, 90; OV, 564, 565; Mem, 17	

Dresden, Germanujo. Z estas akceptita en Teknika universitato Li, n-ro 177, Sep. 1908, p. 385; Zak, 91; Ob, 22; Bru, 66; Mem, 17; Gra, 346	17 Aŭg. 1908
Dresden, Germanujo. Vereinshaus (= asocia domo) Mem, 17	17 Aŭg. 1908
Meissen, Germanujo. Kastelo Mem, 17; Gra 348	18 Aŭg. 1908
Dresden, Germanujo. Operdomo Zak, 91; Mem, 17; Gra, 349	19 Aŭg. 1908
Wehlen, Germanujo. Urbestro Schaale en E salutas Z. Z parolas de balkono de urbodomo Mem, 18; Gra, 350	20 Aŭg. 1908
Chemnitz, Germanujo Mem, 18	22 Aŭg. 1908
Dresden, Germanujo. Ekskurso al vilaĝo Weisser Hirsch Li, n-ro 177, Sep. 1908, p. 448; Mem, 18	23 Aŭg. 1908
Dresden, Germanujo. Ekskurso al Loschwitz Mem, 18	23 Aŭg. 1908
Berlin, Germanujo. Z estas akceptita de ministro pri instruado Zak, 94; Mem, 18	24 Aŭg. 1908
København, Danujo. Stacidomo Mem, 18	26 Aŭg. 1908
København, Danujo. Hotelo Bristol Mem, 18	26 Aŭg. 1908
København, Danujo. Z gastas ĉe E. Skeel Giörling DE, 1908; Mem, 18	26-29 Aŭg. 1908
Hälsingborg, Svedujo. Terasrestoracio Mem, 18; Gra, 351	27 Aŭg. 1908
Helsingor, Danujo. Banhotelo Marienlyst DE, 1908; Gra, 352	27 Aŭg. 1908
Helsingor, Danujo. Kastelo Kronborg DE, 1908; Gra, 353	27 Aŭg. 1908
København, Danujo. Konversacia esperantista klubo DE, 1908	27 Aŭg. 1908
København, Danujo. Muzeo Thorvaldsen DE, 1908	28 Aŭg. 1908
København, Danujo. Bierfarejo Carlsberg DE, 1908	28 Aŭg. 1908
København, Danujo. Zoologia ĝardeno DE, 1908	28 Aŭg. 1908
København, Danujo. Gliptoteko DE, 1908	28 Aŭg. 1908
København, Danujo. Urbestro Jensen en E salutas Z DE, 1908, Gra, 354	28 Aŭg. 1908
København, Danujo. Parko Tivoli DE, 1908; Gra, 354	28 Aŭg. 1908
København, Danujo. Restoracio Wievel DE, 1908; Gra, 355	28 Aŭg. 1908
Bad Reinerz, Germanujo. Villa Métropole Let, 250; Mem, 18	20-28 Aŭg. 1909
Lyon, Francujo. Z vizitas D-ro Henri Dor Let, 250; Mem, 18	30 Aŭg. 1909
Barcelona, Hispanujo. Stacidomo Ob, 23; Bru, 78; EE, 39; Mem, 18	4 Sep. 1909
Barcelona, Hispanujo. Hotelo Colón apud Placa de Cataluna Mem, 18; Gra, 356	4-11 Sep. 1909
Barcelona, Hispanujo. Akcepto de Z en palaco de la belartoj Li, n-ro 189, Sept. 1909, p. 393; Zak, 95; Gra, 356	5 Sep. 1909
Barcelona, Hispanujo. Z ĉeestis piedpilkon ludon Li, n-ro 189, Sep. 1909, p. 394	5 Sep. 1909
Barcelona, Hispanujo. Z ĉeestis koncerton en la teatro Romea Li, n-ro 189, Sep. 1909, p. 394	5 Sep. 1909

Barcelona, Hispanujo. Universitato Li, n-ro 189, Sep. 1909, p. 405; Zak, 95; Ob, 23; Gra, 357	7 Sep. 1909
Barcelona, Hispanujo. Borso Li, n-ro 212, 213, Aŭg.-Sep. 1911, p. 412; Zak, 95; Gra, 357	8 Sep. 1909
Barcelona, Hispanujo. Ekskurso al la monto Tibidado Li, n-ro 189, Sep. 1909, p. 421	9 Sep. 1909
Barcelona, Hispanujo. Ekskurso al Sabadell. Urbestro akceptas esperantistojn Li, n-ro 189, Sep. 1909, p. 382	11 Sep. 1909
Barcelona, Hispanujo. Ekskurso al Montserrat Li, n-ro 189, Sep. 1909, p. 382	12 Sep. 1909
Valencia, Hispanujo. Stacidomo Mem, 18	14 Sep. 1909
Valencia, Hispanujo. Hotelo Palace apud str. Paz Mem, 18; Gra, 360	14-17 Sep. 1909
Valencia, Hispanujo. Z estas akceptita de urbestro Zak, 97; Gra, 114	Sep. 1909
Barcelona, Hispanujo. Hotelo Colón Mem, 18	18 Sep. 1909
Genève, Svisujo. Z haltas inter du vagonaroj Mem, 18	19 Sep. 1909
Dresden, Germanujo. En stacidomo Z renkontiĝas kun W. Ostwald Mem, 18; Zle, 193	20 Sep. 1909
Bad Reinerz, Germanujo. Villa Métropole Mem, 18	21 (?) - 26 Sep. 1909
S. Peterburg, Rusujo. Hotelo OV, 401; Mem, 18	4-7 Majo 1910
S. Peterburg, Rusujo. Urba domo OV, 401; Let, 260; Mem, 18; Gra, 361	4 Majo 1910
Ciechocinek, Rusujo. Zamenhof salutas samideanojn el Bydgoszcz Mem, 18	5 jun. 1910
Bremen, Germanujo. Stacidomo. Z alvenas OV, 566; Mem, 18	2 Aŭg. 1910
Bremen, Germanujo. Z forveturas per ŝipo George Washington OV, 566; Mem, 18	2 Aŭg. 1910
New York, Usono. Stacidomo Mem, 19	11 Aŭg. 1910
Washington, Usono. Stacidomo Bru, 82; EE, 573; Mem, 19	13 Aŭg. 1910
Washington, Usono. Hotelo Arlington Zak, 97; Bru, 82; Mem, 19	13-20 Aŭg. 1910
Washington, Usono. Ekskurso ŝipe sur la rivero Potomac al Mount Vernon Li, n-ro 201, Sep. 1910, p. 419; Mem, 19	17 Aŭg. 1910
Niagara, Usono. Akvofalegoj Li, n-ro 201, Sep. 1910, p. 430; Mem, 19	Aŭg. 1910
Québec, Kanado. Z vizitas sian kuzon Ludoviko Zamenhof Li, n-ro 201, Sep. 1910, p. 430; Mem, 19	Aŭg. 1910
Montreal, Kanado. Stacidomo Mem, 19	fino de Aŭg. 1910
New York, Usono. Z forveturas per ŝipo Kaiserin Auguste Victoria Mem, 19	3 Sep. 1910
Hamburg, Germanujo. Z alvenas Mem, 19	12 Sep. 1910
Hamburg, Germanujo. Z forveturas de stacidomo Mem, 19	13 Sep. 1910
Bad Kissingen, Germanujo. Villa Frankonia Let, 294; Mem, 19; Gra, 364; Zle, 210	12 Jul.-6 Aŭg. 1911
Antwerpen, Belgujo. Stacidomo Ob, 23; Bru, 94; EE, 21; Mem, 19	18 Aŭg. 1911
Antwerpen, Belgujo. Hotelo Excelsior Zak, 101; Bru, 94; Mem, 19; Gra, 365	18-27 Aŭg. 1911
Antwerpen, Belgujo. Urbestro Jan de Vos akceptas Z en la urbodomo Li, n-ro 212, 213, Aŭg.-Sep. 1911, p. 342; Gra, 365	19 Aŭg. 1911

Antwerpen, Belgujo. Reĝa Ateneo Li, n-ro 212, 213, Aŭg.-Sep. 1911, p. 344	21 Aŭg. 1911
Antwerpen, Belgujo. Flandra operejo Li, n-ro 212, 213, Aŭg.-Sep. 1911, p. 353	21 Aŭg. 1911
Antwerpen, Belgujo. Zoologia ĝardeno Li, n-ro 212, 213, Aŭg.-Sep. 1911, p. 358	23 Aŭg. 1911
Paris, Francujo. Z vizitas firmon Gaumont en rue des Alouettes Mem, 19; Gra, 366	28 Aŭg. 1911
Bad Salzbrunn, Germanujo. Villa Waldfrieden apud Ida-Hof str. Let, 309, 310; Mem, 19; Gra, 367	antaŭ 10 Jun.-6 Jul. 1912
Krakovo, Aŭstrujo. Stacidomo Ob, 23; Bru, 101; EE, 304; Mem, 20	nokte 9/10 Aŭg. 1912
Krakovo, Aŭstrujo. Hotelo Grand Zak, 104; Bru, 101; Mem, 20; Gra, 367	10-18 Aŭg. 1912
Krakovo, Aŭstrujo. Komerca akademio Li, n-ro 224-226, Aŭg.-Sep. — Okt. 1912, p. 309	11 Aŭg. 1912
Krakovo, Aŭstrujo. Malnova teatro Li, n-ro 224-226, Aŭg.-Sep. — Okt. 1912, p. 340	12 Aŭg. 1912
Wieliczka, Aŭstrujo. Salminejo Li, n-ro 224-226, Aŭg.-Sep. — Okt. 1912, p. 344; Ob, 23; Mem, 20; Gra, 369	13 Aŭg. 1912
Krakovo, Aŭstrujo. Nova teatro Li, n-ro 224-226, Aŭg.-Sep. — Okt. 1912, p. 355	14 Aŭg. 1912
Zakopane, Aŭstrujo Mem, 20	18 Aŭg. 1912
Morskie Oko. Aŭstrujo Mem, 20	19 Aŭg. 1912
Bad Neuenahr, Germanujo. Hotelo Weinstock, poste Villa Erna OV, 544; Let, 339; Mem, 20; Gra, 371, 373	18 Jul.-22 Aŭg. 1913
Paris, Francujo. Z vizitas Centran Oficejon en 51 rue de Clichy Mem, 20	15 Aŭg. 1913
Montrouge, Francujo. Z parolas ĉe entombigo de C. Bourlet OV, 412; Mem, 20; Gra, 126	16 Aŭg. 1913
Bern, Svisujo. Stacidomo Ob, 23; Bru, 112; EE, 48; Mem, 20	23 Aŭg. 1913
Bern, Svisujo. Domo apud Schänzlihalde Mem, 20; Gra, 375	23-31 Aŭg. 1913
Bern, Svisujo. Kazino Li, n-ro 237-239, Sep.-Okt.-Nov. 1913, p. 352; Gra, 376	25 Aŭg. 1913
Bern, Svisujo. Universitato Li, n-ro 237-239, Sep.-Okt.-Nov. 1913, p. 374; Gra, 375	26 Aŭg. 1913
Bern, Svisujo. Teatro Li, n-ro 237-239, Sep.-Okt.-Nov. 1913, p. 380	27 Aŭg. 1913
Bern, Svisujo. Ekskurso al Thun, Interlaken Li, n-ro 237-239, Sep. — Okt.-Nov. 1913, p. 389	28 Aŭg. 1913
Köln, Germanujo. Stacidomo EE, 291; Pri, 119; Mem, 20	1 Aŭg. 1914
Berlin, Germanujo Mem, 20	Aŭg. 1914
Sassnitz, Germanujo. Stacidomo Mem, 20	Aŭg. 1914
Ystad, Svedujo. Stacidomo Mem, 20	Aŭg. 1914
Stockholm, Svedujo. Stacidomo Mem, 20	Aŭg. 1914
-----, Finnlando OV, 578; Mem, 21	Aŭg. 1914
Varsovio, Rusujo Mem, 21	Inter 15 kaj 17 Aŭg. 1914
Varsovio, Rusujo. Strato Królewska 41 OV, 473; Pri, 125; Mem, 21; Gra, 379	Jul. 1915-14 Apr. 1917
Krakovo, Aŭstrujo. Sinagogo. Z ĉeestis en la sinagogo.	15 Aŭg. 1912

En letero de 5-a de Oktobro 1952 S-ro Salzmänn skribis al S-ro Jossinet:
 "Mi ne ĉeestis la Krakovan Kongreson (1912), sed miaj amikoj, kiuj vizitis ĝin
 (ili ĉiuj estis gasmortigitaj dum la lasta milito), tiam rakontis al mi, ke Zamenhof,
 dum sia ĉeesto en la Krakova Sinagogo, estis honorvokita al la "Tora", kaj
 donacis monon por la sinagogo, por malriĉaj malsanuloj kaj por la hebrea
 maljunulejo". (La nica literatura revuo. Majo-Junio 1960, p. 166).

Bern, Svisujo. Sinagogo. Z ĉeestis en la sinagogo.

Aŭg. 1913

Ĉe la Kongreso en Bern D-ro Olsvanger aranĝis, ke **sabate** okazu preĝado
 en la Berna sinagogo. Li insistis, ke Zamenhof ĝin partoprenu. Tiu unue
 rifuzis, por ne demonstri sian religi-apartenon, supozinte, ke tio ĉi povas iel
 malutili al Esperanto, ĉu pro ebla malŝato al judoj (kiu povus influi al la ne
 Esperantista publiko); ĉu pro la postulo de nacia kaj religia senpartieco de
 li propagandita. Sed Olsvanger argumentis, ke tiel aŭ alie, la Majstro ne
 sukcesos (eĉ ne demonstrante sian nacian apartecon) depreni de la
 malŝatantoj de la judoj ilian sintenon al Esperanto, se ĝi estas anticipe
 negativa. De alia flanko, demonstri prireligian indiferentecon ankaŭ estas
 malkonvene al la aŭtoro de "Preĝo sub la verda standardo".

Zamenhof ja aperis en la sinagogo. Alestis judoj kaj ne judoj. Olsvanger
 "sidigis lin sur la honoran sidlokon, ĉe la orientdirekta preĝejmuro, kaj
 donis al li silkan blankan preĝtukon kun bluaj strioj, per kiu la Majstro sin
 envolvus. Dum laŭtleĝo de la Biblio li estis-honorita per alvoko al la ambono,
 de kiu li audigis la konvenajn bendirojn de "Maftir". Sed la kulmina surprizo
 estis la rabena prediko, farita en Esperanto."
 Estis Olsvanger, kiu instruis al la rabeno la lingvon, kaj helpis al li verki la predikon,
 bazitan sur Cefanja 3/9; "Tiam mi redonos al la popoloj lingvon puran".

Tute mutis la tiamaj Esperantaj gazetoj, kaj ankoraŭ ĝis nun ne aperis raporto
 pri tiu signifa evento.

Al popoloj mi redonos
 Lingvon, kiu pure sonos,
 Por ke unu sola horo
 Voku al la Disinjoro.

(The Australian Esperantist", Sep.-Okt. 1961, p. 149).

Mia rimarko. En la "Lingvo Internacia", n-ro 237-239, Sep.-Okt.-Nov. 1913,
 sur p. 349 mi trovis, ke tri diservoj: hebrea, protestanta kaj katolika okazis
dimanĉe, la 24-an de Aŭgusto 1913. En la sinagogo predikis rabeno Saphra
 meze de profunda silento. A. H.

Adolf Holzhaus

1976.

ESPERANTO SEM PRECONCEITOS

Walter Francini

Vendidos mais de 800 exemplares. Obra
 em que o autor analisa os preconceitos con-
 tra o Esperanto e mostra a inconsistência de
 todos eles. Pedidos a:

Associação Paulista de Esperanto
 Caixa Postal n.º 5.588
 01000 - São Paulo, SP

HEROLDO DE ESPERANTO

**duonmonata sendependa internacia
 Esperanto-gazeto**

Jarabono por la membroj de B.E.L.

Cr\$ 120,00

Respekto kaj Amo

Porto Carreiro Neto

Kiu legas la hodiaŭan literaturon de Esperanto, tiu klare vidas, kiel malsama ĝi estas, ol la literaturo de la unuaj jaroj. La unua diferenco, kiun oni rimarkas, estas la pli granda nombro da vortoj; la dua estas la sintakso mem, kvazaŭ la modernuloj povos-cius la lingvon pli bone, ol eĉ ĝia aŭtoro mem.

La supereco de Esperanto kontraŭ la lingvoj "naturaj" kuŝas ĝuste sur la reguleco de ĝia gramatiko: unu finiĝo por ĉiu kategorio, samaj formoj por samaj okazoj. Foje, parolante kun amiko pri tiu reguleco, ekzemple ĉe la formado de la virinsekso, mi aŭdis de li ĉi tiun simplan rediron: — "Jes, sed ĉi tio sonas monotone"... Jes, mi nun miavice diras, pro tiu "monotoneco" kaj "malagrableco", hodiaŭ la modernuloj jam ne diras "malriĉa", "mallaborema", "malluma", k.t.p.; certe (?) "povra", "pigra", "obskura" estas multe pli belaj, pli elegantaj, pli esprim-povaj (kaj ankaŭ pli pavecaj)... Sendube Zamenhof mem enkondukis plurajn neologismojn flanke de vortoj konstruitaj el la simplaj elementoj de la lingvo, kaj opiniis, ke la sola vojo de la evoluado de Esperanto estas la vojo de neologismoj; tamen la ekskluziva uzado de neologismoj, sisteme antaŭaŭantaj la vortojn konstruitajn en la lingvo, ŝajnas al mi nekonsilinda. Baldaŭ la prefikso "mal" estos muzea antikvaĵo; post ĝi, ni ne dubu, sekvos aliaj afiksoj, ĉar malplaĉas al la venontaj literaturistoj la serio da "-inoj", "-ecoj" k.t.p. Kiam afiksoj estos malpliigitaj ĝis nenieco, aŭ preskaŭ ĝia nuleco, tiam Esperanto estos "efektiva" lingvo, ĉar tute simila al la veraj lingvoj "de homo". Tiam oni lernos

ĝin tiel bone (? !), kiel ĉiun alian lingvon; kaj la popoloj vere interkompreniĝos!

Sed ne neologismoj mem prezentas la plej grandan malbonon, ĉar kelkaj fariĝas ja necesaj; kio plej multe ĉagrenas kaj maltrankviligas la koron al tiuj, vere amantaj la lingvon kaj profunde respektantaj la nomon de ĝia aŭtoro, tio estas la neniel imagebla senceremonieco, kun kiu certaj samideanoj traktas la idon de tiu senkompara geniulo. Estas nekredeble, kiel ili taŭzas, tretas, ĉifas la belan verkon, tiel lerte kaj zorge konstruitan, supozante — kaj eĉ publike fierante! — ke ili estas "pli logikaj", ol la majstro, la farinto! Tio igas min rememori anekdoton pri la konstruo de la mondo. Unu kamparano, konsiderante la bonaĵojn kaj la (laŭŝajnajn) malbonaĵojn de la Naturo, iam ekkriis:

— "Ĉi tiu mondo estas perfekta fuŝaĵo! Nu, birdoj havas flugilojn, sed bovoj ne: kial? Ankaŭ bovoj devus ja flugi!"

En tiu momento, birdeto "kraĉis" sur lian kapon, kaj tiam li plej humile konfesis: "Dio estu laŭdata, ke tio estis simpla birdo!"

Neniu povas flati al si, ke li uzas la lingvon ĉiam senerare; Esperanto ne estas tiel simpla kaj tiel facila, kiel la propagandistoj distrompetas kaj kiel kredas iuj sinjoroj, precipe dogmuloj: ho tiaj dogmuloj! Iam estis dogmo de la senmoveco de la tero, sed nia planedo, ne timante la fajron de Gehena, tamen plue moviĝis... Sed eraradi sisteme kaj konscie **kontraŭ** la aŭtoro mem de la lingvo — tio transpaŝas ĉiajn limojn. Ankaŭ eltrovi kaj eldiri regulojn nur partajn, kies malverecon ĉiu povas facile konstati ĉe pli atenta legado de klasikuloj — tio ĝislimas blindecon de blindaj, kondukantaj en foson aliajn blindajn.

Estas kurioze konstati, ke en la regno de sia gepatra lingvo ĉiu estas servute obeema; sed en Esperantujo ĉiu — eĉ flabekuloj, kies vindaĵoj ankoraŭ fiodoras — arogas al si ian senĝenecon kaj ian leĝdonan povon, kiajn neniu kaj nenio al iu ajn konsentis.

Vere, samideanoj, Esperanto estas ĝis hodiaŭ ne sufiĉe esplorita; ĝi havas en si multe da ankoraŭ ne rimarkitaj anguloj, kaj tamen, anstataŭ tiu pacienca traserĉado, antaŭ ol

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Ata da Sessão Ordinária da Liga Brasileira de Esperanto, realizada em 2 de julho de 1977.

Aos dois dias do mês de julho de 1977, às dezessete horas, reuniu-se a Assembléia Geral da Liga Brasileira de Esperanto, em sua sede à Praça da República, 54, 2.º andar. A convocação foi feita na forma prevista nos Estatutos, tendo comparecido número suficiente de sócios e de representantes de instituições filiadas, conforme registro no livro de presença. O Presidente, Luiz Alberto Brandão Martins, propôs a seguinte Ordem do Dia, aprovada sem discussões: 1) Eleição de membro da Diretoria; 2) Eleição de membro do Conselho Fiscal e substituições nos quadros dos Conselhos Fiscal e Consultivo; 3) Aprovação da Cota de Adesão para 1978; 4) Assuntos Gerais. Passando ao primeiro item, o Presidente leu a carta em que o Coronel Jorge Campos de Oliveira pede exoneração do cargo de Secretário Geral da Liga, por motivos de ordem particular. Após destacar os bons serviços prestados por Jorge Campos de Oliveira, nos muitos anos em que auxiliou a Diretoria, o Presidente manifestou o desejo de que, cessados os motivos que o levaram a se exonerar, volte o Coronel Campos a colaborar com a Liga, seja na Diretoria ou fora dela. A fim de preencher a vaga, foram propostas e unanimemente aceitas as seguintes alterações: o atual Primeiro Secretário, Floriano Pes-



atingi pli planan konadon de la lingvo, jen iuj jam rapidas enkonduki novaĵojn (mi nun ne parolas pri neologismo) tiel arogante, ke oni eĉ ekkrias, rememorante la saĝan "Fundamenton": "Fi, kiel abonene!" Ne, amikoj! Tia vojo neniom taŭgas; tia konduto estas nelaŭdinda.

Al la majstro ni ŝuldas respekton, kaj al lia verko amon.

(Esperanto Triunfanta, n-ro 13,
Jan.-Feb. 57)

soa, passou a Secretário-Geral; Da. Regina de Barros Pessoa, Segunda Secretária, passou a Primeira Secretária; Antonio Eduardo Lage, responsável pelo Curso Elementar por Correspondência, e pelo Serviço de Informações da Liga, ocupou o cargo de Segundo Secretário. Prosseguindo os trabalhos, voltou o Presidente a referir-se à importância do Conselho Fiscal no efetivo controle das contas da Liga — função que requer maior presença do associado, pelo menos por ocasião das Assembléias. Com o objetivo de dar ao Conselho Fiscal elementos para um trabalho mais atuante, foi proposta e aceita a substituição do Sr. Vivaldo M. Silva, que não aderiu à Liga em 1977, pelo Sr. Aloisio Sartorato; a vaga deixada por Antonio Lage, que passou à Diretoria, foi ocupada pelo Sr. Kleber Halfeld, antes membro do Conselho Consultivo. Para o Conselho Consultivo, no lugar de Halfeld, foi aprovado o nome de Luiz Alberto de Oliveira Coelho, de Paraíba do Sul. Finalmente, e atendendo ao mesmo objetivo de dinamização do Conselho Fiscal, foi proposta e aceita a seguinte movimentação: Sylla Chaves, do Conselho Consultivo, passou ao Conselho Fiscal; Pinto do Carmo, do Conselho Fiscal, passou ao Conselho Consultivo. Seguiu-se exposição, pelo Presidente, das variações registradas nos valores da Cota de Adesão à Liga, e uma comparação de tais valores com os do Salário Mínimo do Rio de Janeiro. Em decorrência, foi proposto por Sylla Chaves, e aceito por todos, o valor de Cr\$150,00 (cento e cinquenta cruzeiros) para a tarifa M-1, válida para todo o ano de 1978. Ficou mantida a atual relação entre as tarifas M-1 e M-2, isto é, os sócios da categoria mais alta dão uma contribuição duas vezes maior, para auxiliar a Liga. Nos assuntos gerais, foi lembrado aos presentes que, conforme prescrevem os Estatutos, haverá eleições para a Diretoria da Liga, no próximo mês de dezembro. Foi proposta e aceita a data de 17 de dezembro de 1977 para a Assembléia Geral, em que o único item da Ordem do Dia será a eleição dos novos diretores. O Presidente pediu que todos procurem divulgar o fato entre os esperantistas associados, para que a sessão de 17 de dezembro reúna o maior número possível de membros com direito a voto. Na ocasião, o Presidente reiterou o propósito dos membros da atual Diretoria, de não se candidatarem a novo período, a fim de permitir a renovação dos dirigentes da entidade. Esprimi sua opinião pessoal de que o Sr. Sylla Chaves seria um bom candidato à Presidência. Por último, lembrou o Presidente a conveniência de que a posse efetiva da nova Diretoria se dê no último sábado de janeiro de 1978, data em que a Diretoria antiga apresentará seu relatório final. Esta proposição foi aceita unanimemente. E nada mais havendo a tratar foi encerrada a sessão de que eu, Secretário Geral, lavrei esta Ata, que vai assinada por mim e pelo Presidente. Rio de Janeiro, 2 de julho de 1977. Floriano Pessoa, secretário — Luiz Alberto Martins, Presidente.

MILITISTA VIVO

Korespondado de Rekruto

Humberto de Campos

I

"Mia kara patro,

Mi alvenis al Rio de Janeiro la duan de l' nuna monato, kune kun la ceteraj soldatoj de nia bataliono, la 15-a de infanterio. La militista vivo tre plaĉas al mi. Bonvolu diri al mia patrino ke ŝi ne zorgu pri mi kaj ne forgesu ricevi la sumon de 18 milrejsaj, kiun Antoĉjo ankoraŭ ŝuldas al mi pro la vendo de la **bikudo** (1) kaj de la papago. Alvenis putra la dolĉaĵo en la skatolo sendita de Rajmonjo. Torkvato, filo de S-rino Antonjo, estas kaptita de maldigestado pro manĝita akvomelono kaj estas en la Hospitalo. Mi petas ke vi sendu al mi la sumon de 150 milrejsaj por ke mi povu aĉeti novan uniformon, ĉar la infanteria servado tre ŝiras niajn vestojn.

Memorigu min al la niaj, kisu patrinton kaj benu vian filon.

Frederiko".

II

"Frederiko, mia filo,

Mi ricevis vian letereton kaj tre ĝojis pro viaj informoj pri la militista vivo. Via patrino multe ploradis pro via foresto, sed ŝi jam estas iom konsolita. Rajmonjo preparas alian dolĉaĵon por sendi al vi.

Mi sendas al vi la petitan sumon por aĉetado de nova uniformo. Mi memorigas vin ke, enkalkulante tiun sumon, vi jam elspezis depost via foriro la sumon de 1.250 milrejsaj. Estas tre strange ke vi estas devigata aĉeti ĉion — boton, uniformon, kepon, karabenon, kaj eĉ municion, dum la ceteraj rekrutoj ĉion ricevas de la registaro. Vi estas la sola, ĝis hodiaŭ, uniformvestita kaj armita je kostopago de sia patro. Ricevu la kisojn

de via patrino kaj ĉirkaŭprenon de via patro kaj amiko

Eleŭtero".

III

"Mia kara patro,

Ne estis sen ĝojo kaj samtempe sen malĝojo, ke mi ricevis vian letereton, per kiu vi sciigas min pri la niaj kaj faras al mi maljustajn admonojn pri la mono de mi jam ricevita.

Mi bone scias ke estas knaboj, inter kiuj troviĝas tiuj venintaj el tie, kiuj ricevis de la registaro la boton, la uniformon, la ledajaron, la armilojn kaj la municiojn. Tamen kedu ke neniu bonfamilia filo faris tion, peze ŝarginte la regnan Kason. Ĉiu sinestimanta rekruto sin vestas kaj sin armas kostopage de sia patro.

Rilate tion, mi komunikas al vi ke nia regimentestro decidis transloki min en la kavalerion. Tio estas honoro de malmultaj atingita. Tamen, ĉar estas necese ke mi akiru novan uniformon kaj ĉevalon, mi petas ke vi sendu al mi plian sumon de 1.000 milrejsaj. Mi esperas ke mia patreto nepre sendu al mi tiun sumon postulitan de la militaj progresoj de via filo kaj memorigu min al mia patrino. Benu vian tutkore

Frederiko".

IV

"Mia filo,

Jen mi sendas al vi la sumon de 1.000 milrejsaj, por ke vi aĉetu ĉevalon kaj la uniformon postulitan de la nova armeoparto, en kiu vi servos.

Nun, mia filo, plenumu peton, samtempe mian kaj de via patrino: tute ne akceptu vian translokigon en la Marmiliton. Vi bone scias ke ni estas malriĉaj kaj tute ne povus aĉeti por vi kirasŝipon.

Via patro

Eleŭtero".

Trad. A. Couto Fernandes

(1) **Bikudo**, brazila birdo.

MIAJ KANTOJ

Jozefo Joels

*Kantadi mi volis pri spacoj senlimaj,
Pri neĝaj montpintoj, junsanga ekard';
Pri amaj katenoj, liberaj animoj,
Deziro kaŝita en klara rigard'.*

*Kaj ankaŭ pri ĉiu homfaro giganta,
Naturmirindaĵoj, mondkrea mister';
Pri mildaj karesoj, pasio flamanta,
Pri l' tagoj miljaraj multvivaj de l' Ter'...*

*Sed venas, revenas detruaj ondegoj
Da batoj kruele vundantaj de l' Sort'.
Sangante penluktas mi inter baregoj,
Animo mutiĝas eĉ meze de vort'...*

*Kaj kantoj ravplenaj, apenaŭ naskitaj,
Tuj tutmallaltiĝas dolore en kor'
Kaj restas sub nigra revcindro kaptitaj –
Ĝis tago favora, ĝis luma ĝojhor'.*

• • •

NEKROLOGO

Eugen Wüster

*La 29-an de Marto 1977, mortis D-ro
Eugen Wüster, fondinto de la scienca espe-
rantologio.*

*D-ro Wüster naskiĝis en la 3-a de Oktobro
1898 en Wieselburg (Malsupra Aŭstrujo).
Junaĝa li lernis Esperanton kaj en 1918
eklaboris super la ĉefverko de nia leksiko-
grafio: Enciklopedia Vortaro.*

*Liaj ĉefaj verkoj estas: Maŝinfaka Vortaro
(1923), Oficiala Radikaro (1924), kaj Za-
menhof-Radikaro (1927).*

*Laŭ la opinio de plej kompetentaj espe-
rantistoj, D-ro Wüster estis la patro de la
esperantologio.*

BIBLIOGRAFIO

*Tito kaj la Nealiancitéco, D-ro Ranka
Petković. Eldono de Esperanto-Societo Sara-
jevo, Jugoslavio. 1977. 13 x 21 cm. Ilustrita.
40 pĝ. Traduko el serbokroata lingvo.*

*Broŝuro pri la jugoslavia decidigo por la
nealiancitéco kaj pri la rolo de Tito en la
kreado de la doktrino kaj movado de la
nealiancitéco.*

• • •

*Česká Třebová. Eldono de Esperanta ron-
deto "Amiketo", Česká Třebová, Ĉeĥoslo-
vakio. Tekstoj de A. Rezníková, H. Fojtová,
E. Mikolecký kaj B. Štangler. Ilustrita. 24. p.*

*Riĉe ilustrita broŝuro pri Česká Třebová,
unu el la plej malnovaj urboj de orienta
Bohemio.*

• • •

*Vivo de Laboristo en la Kolonia kaj Nov-
kolonia Epokoj, J. van Munster. 1976. 112
p.*

*Aŭtobiografio de 84jara esperantisto
spertinta travivaĵon kiel teknika maristo de
la nederlanda militŝiparo.*

• • •

*Reminiscência de um Esperantista, Mario
Ritter Nunes. 48 p. 1977.*

*Kolekto de tezoj prezentitaj en Brazilaj
Esperanto-Kongresoj.*

• • •

*Vivo de Zamenhof, E. Privat. The Espe-
ranto Publishing Company. 133 tekstpaĝoj.
13 fotoj. Represo de la 5-a eldono. 1977.*

*Klasika biografio verkita de mondfama
esperantisto.*

MOZAIKO

Internacia Esperanto-Muzeo


Fondita en 1927, hodiaŭ ĝi estas, per kontrakto kun la aŭstra Instruministerio, aparta kolekto de la mondfama Aŭstruja Nacia Biblioteko.

En la 5 grandaj salonoj (500 m²), konstanta ekspozicio montras la disvastigon kaj uzeblecon de Esperanto, kiu konvinkos eĉ dubemulojn. La biblioteko, entenanata pli ol 13.000 volumojn, estas malfermita lunde, merkrede kaj vendrede, sen enirpago.

Internacia Esperanto-Muzeo eldonas Informilon haveblan kontraŭ 8 internacia respondkupono ĉe: Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, 1010 Vieno, Aŭstrujo.

Popolaj Brazilaj Proverboj

- Montinto ne malakceptas tombon.
- Maljuna papago ne lernas paroli.
- Senenhava sako ne starigas.
- Grajno post grajno, kokino plenigas la kropon.



... kaj oni informis, ke la festo de la nudistoj okazos tie ĉi!!!